

PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

Ili montris al ni neordinaran bonecon (Ago 28, 2)

18. - 25.01.2020

IKUE Romo/Zagrebo, januaro 2020

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:

- Uilso Aragono, Mata De Prata, Brazilo
- Alberto García Fumero, Ciudad de La Habana, Kubo
- Antonio De Salvo, Guidonia, Italio
- Bernard Schwaiger, Arnstadt, Germanio
- Carmel Mallia, Zabbar, Malto
- Cristian Mocanu, Deva, Rumanio
- Daniel Chevalier, Ecquevilly, Francio
- sac. Gabriel Anda, Edea, Kamerunio
- Im Hamu, Seoul, Koreio
- Marija Belošević, Zagreb, Kroatio
- Mike Leon, Lower Hutt, Novzelando
- Milton Lacerda, Santos, Brazilo
- Paola Birgit Giommoni, Arezzo, Italio
- Pavol Petrik, Pečovská Ves, Slovakio
- sac. Serhij Prutko, Kievo, Ukrainio
- Veronika Kirsch, Szekszárd, Hungario
- Vitor Luiz Rigoti Dos Anjos, Serra (Espírito Santo), Brazilo

Reviziis: Antonio De Salvo

Kompilis kaj grafike aranĝis: Marija Belošević

La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
Via di Porta Fabbrica 15
IT-00165 ROMA RM, Italio

ikue@ikue.org

ikue.reto@gmail.com

www.ikue.org

www.esperokatolika.org

Fejsbuko de IKUE: goo.gl/Vv21BD

groups.yahoo.com/group/ikue/

www.radio-vatikana-esperanto.org

www.fontoj.net

Estimataj,

En la manoj la okan jaron sinsekve vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de deksepope de bonvolaj personoj kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montras propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „Ke ĉiuj estu unu“.

Denove ĉi jare, ne pretendante grandecon, tamen oni povas konstati ke la teamo iel montras la universalecon, tutglobecon en la pozitiva senco (Brazilo, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kamerunio, Koreio, Kroatio, Kubo, Malto, Novzelando, Rumanio, Slovakio, Ukrainio).

Certe pluraj inter vi ĉeestos lokajn preĝokunvenojn kaj eble en la manoj tenos tiujn tekstojn en propra lingvo. Pro tio certe iuj starigos demandon kial la traduko al Esperanto estis farita?

Mi deziras memori al vi, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la ttt-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, sur tiuj tekstoj baziĝis ankaŭ la Ekumenaj diservoj dum la UK en Bjalistoko, Hanojo, Rejkjaviko, Bonaero, Lillo, Nitro kaj Lisbono, kaj ĉiujtagaj preĝoj dum la Ekumenaj Ekongresoj en Trento kaj Strasburgo.

Ĉi tiu kompilaĵo do havas pluran utileblecon. Jen kelkaj ideoj:

- dum la Preĝosemajno, en via loko vi povos kolekti Esperantistojn je E-lingva preĝo kaj meditado super la tekstoj (ne forgesu „kie estas du aŭ tri kolektitaj...“)
- preĝorondoj jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno
- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj
- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-aranĝoj, ĉar necesas nur elekti „tagon“ kaj okazigi ekumenan preĝokunvenon; grandaj aranĝoj kiel Universala Kongreso, kaj simile jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo.

Gravas la mencio, ke la tekstoj ne estas nur por la semajno inter la 18-a kaj 25-a de januaro. Libere uzu ilin dum la tuta jaro, ĉar preĝi neniam sufiĉas. Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.

Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuraĝiga, kaj malfermis perspektivon por iu estonta simila laboro.

Pacon kaj bonon!

Marija Belošević,

prezidantino de IKUE

BIBLIA TEKSTO POR LA JARO 2020

Ago 27,18-28,10

Kaj kiam ni estis treege premataj de la ventego, la sekvantan tagon ili komencis elĵetadon; kaj la trian tagon oni elĵetis per siaj propraj manoj la ekipaĵon de la ŝipo. Kaj kiam dum multe da tagoj nek suno nek steloj ekbrilis sur nin, kaj uragano nemalgranda ĉirkaŭis nin, fine ĉia espero pri nia savo estis forprenita. Kaj kiam ili jam de longe nenion manĝis, Paŭlo, stariĝinte meze de ili, diris: Ho viroj, vi devis aŭskulti min, kaj ne ŝipiri el Kreto, kaj ne suferi ĉi tiun difekton kaj perdon. Kaj nun mi admonas vin esti kuraĝaj; ĉar estos neniŭ perdo de vivo inter vi, sed nur de la ŝipo. Ĉar en tiu nokto staris apud mi anĝelo de la Dio, kies mi estas kaj al kiu mi servas, dirante: Paŭlo, ne timu; vi devas stari antaŭ Cezaro; kaj jen Dio donacis al vi ĉiujn, kiuj marveturas kun vi. Tial, viroj, kuraĝu; ĉar mi kredas al Dio, ke la afero estos tiel, kiel estas dirite al mi. Tamen ni devas esti ĵetitaj sur ian insulon. Sed kiam venis la dek-kvara nokto, kaj ni estis ĉirkaŭpelataj en la Adria maro, la maristoj eksentis ĉirkaŭ noktomezo, ke ili alproksimiĝas al ia lando; kaj sondinte, ili trovis dudek klaftojn; kaj post mallonga interspaco ili ree sondis, kaj trovis dek kvin klaftojn. Kaj timante, ke ni falos sur malmolajn lokojn, ili ĵetis kvar ankrojn el la ŝipmalantaŭo, kaj preĝis, ke tagiĝu. Kaj kiam la maristoj serĉis rimedon forkuri el la ŝipo, kaj jam mallevis la boaton en la maron sub preteksto, ke ili demetos ankrojn el la antaŭo, Paŭlo diris al la centestro kaj la soldatoj: Se ĉi tiuj ne restos en la ŝipo, vi ne povas saviĝi. Tiam la soldatoj detranĉis la ŝnurojn de la boato, kaj lasis ĝin defali. Sed ĝis venis la tagiĝo, Paŭlo petis ĉiujn, ke ili prenu iom da nutraĵo, kaj li diris: La nuna tago estas la dek-kvara, en kiu vi daŭre atendas kaj fastadas, preninte nenion. Tial mi petas vin preni nutraĵon, ĉar ĉi tio koncernas vian savon; ĉar eĉ unu haro ne pereos el la kapo al vi ĉiuj. Kaj dirinte tion kaj preninte panon, li donis dankon al Dio antaŭ ĉiuj; kaj dispeciginte ĝin, li komencis manĝi. Tiam ili ĉiuj kuraĝiĝis, kaj ankaŭ mem prenis nutraĵon. Kaj ni ĉiuj en la ŝipo estis ducent sepdek ses animoj. Kaj manĝinte ĝissate, ili malpezigis la ŝipon, elĵetante la tritikon en la maron. Kaj kiam plene tagiĝis, ili ne rekonis la landon; sed ili ekvidis unu golfeton kun sablaĵo, kaj ili konsiliĝis inter si, ĉu ili povos surpeli sur ĝin la ŝipon. Kaj forlasinte la ankrojn, ili lasis ilin en la maro, kaj samtempe malligis la ŝnurojn de la direktiloj; kaj suprenlevinte la antaŭvelon kontraŭ la vento, ili sin direktis al la sablaĵo. Sed trafinte lokon, kie du marmovoj sin renkontas, ili surterigis la ŝipon; kaj la antaŭo fiksiĝis kaj restis nmovebla, sed la malantaŭo rompiĝis de la forto de la ondoj. Kaj fariĝis intenco ĉe la soldatoj mortigi la malliberulojn, por ke neniŭ el ili elnaĝu kaj forkuru. Sed la centestro, dezirante savi Paŭlon, malhelpis ilin de tiu decido, kaj ordonis, ke tiuj, kiuj povas naĝi, forĵetu sin unuaj kaj iru al la tero; kaj ke la ceteraj sin savu, jen sur tabuloj, jen sur diversaj objektoj el la ŝipo. Kaj tiamaniere ĉiuj saviĝis sur la teron.

Kaj kiam ni saviĝis, tiam ni sciiĝis, ke la insulo estas nomata Melita. Kaj la barbaroj montris al ni neordinaran bonecon; ĉar ili ekbruligis fajron kaj akceptis nin ĉiujn pro la tiama pluvo kaj pro la malvarmeco. Sed kiam Paŭlo kolektis faskon da vergoj kaj metis ĝin sur la fajron, vipuro, elveninte de la varmo, alkroĉiĝis al lia mano. Kaj kiam la barbaroj vidis la beston pendantan de lia mano, ili diris unu al alia: Sendube ĉi tiu viro estas mortiginto, al kiu, kvankam li saviĝis de la maro, tamen Justeco ne permesas vivi. Sed li forskuis la beston en la fajron, kaj ne suferis malbonon. Sed ili atendis, ke li ŝvelos aŭ falos subite mortinta; sed longe atendinte, kaj vidinte, ke nenia malbono okazas al li, ili ŝanĝis sian opinion, kaj diris, ke li estas dio. Proksime de tiu loko estis bieno, apartenanta al la estro de la insulo; lia nomo estis Publio; li akceptis nin kaj amike gastigis nin tri tagojn. Kaj la patro de Publio kuŝis malsana de febro kaj disenterio; al li Paŭlo eniris, kaj preĝis, kaj, metinte la manojn sur lin, sanigis lin. Kaj post tiu faro, ankaŭ ceteraj insulanoj, kiuj havis malsanojn, venis kaj estis sanigitaj; ĉi tiuj ankaŭ honoris nin per multaj honoroj; kaj kiam ni ekveturis, ili surŝipigis ĉion, kion ni bezonis.

TEOLOGIA KAJ PASTORALA ENKONDUKO AL LA TEMO

Ili montris al ni neordinaran bonecon (Ago 28, 2)

La tekstojn por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj de 2020 pretigis la kristanaj Eklezioj en Malto kaj Gozo (Unuiĝintaj Kristanoj en Malto). La 10-an de februaro, multaj kristanoj en Malto celebras la feston de ŝiprompiĝo de Sankta Paŭlo, substrekante kaj dankante la alvenon de kristana kredo al tiuj insuloj. La legaĵo de Agoj de Apostoloj uzata en tiu ĉi festo estas la teksto elektita por la Semajno de Preĝado de tiu ĉi jaro.

La historio komenciĝas per la alkonduko de Paŭlo al Romo kiel enkarcerigito (Agoj 27, 1 ktp.). Paŭlo estas enprizonigita, sed eĉ dum vojaĝo fariĝanta danĝera la misio de Dio daŭras per li.

Tiu ĉi rakonto estas klasika dramo de la homaro alfrontata de la timegiga potenco de la naturaj elementoj. La pasaĝeroj estas senprotektaj antaŭ la forto de maro malsupre kaj la potencaj tempestoj stariĝantaj ĉirkaŭ ili. Tiaj fortoj kondukas ilin al nekonata teritorio, kie ili estas perditaj kaj sen esperoj.

La 276 homoj sur ŝipo konsistas el apartaj grupoj. La centestro kaj liaj soldatoj havas potencon kaj aŭtoritaton, sed dependas de la lerteco kaj spertoj de la ŝipistoj. Kvankam ĉiuj estas timigitaj kaj senprotektaj, la malliberuloj estas la plej senprotektaj el ĉiuj. Iliaj vivoj estas taksataj kiel forlaseblaj, ili riskas suferi kruelan ekzekutadon (laŭ 27, 42). Dum la disvolviĝo de la rakonto, sub premo kaj timantaj pri siaj propraj vivoj, eblas vidi la malfidon kaj la suspekton kiuj pligrandigas la dividojn inter la diversaj grupoj.

Notinde, tamen, Paŭlo elstaras kiel centro de paco ene de la tumulto. Li scias, ke lia vivo ne estas estrata de fortoj indiferentaj al lia destino, sed ĝi estas sekura je la manoj de Dio, al Kiu li apartenas kaj servas (laŭ 27, 23). Pro sia kredo, li havas fidon, ke li staros antaŭ la imperiestro en Romo, kaj per la forto de sia kredo li povas stari antaŭ siaj samŝipanoj kaj glori Dion. Ĉiuj kuraĝiĝas. Sekvante la ekzemplon de Paŭlo, ili dividis inter si la panon, unuiĝintaj en nova espero kaj fidantaj je liaj vortoj.

Tio ĉi indikas la ĉefan temon de tiu ĉi okazintaĵo: la Dia providenco. La decido navigi en malbona vetero estis de la centestro, sed dum la tempesto la ŝipistoj faras decidojn pri la maniero regi la ŝipon. Sed, fine, iliaj planoj mem estas ŝanĝitaj kaj, nur restante kune kaj permesante la sinkadon de la ŝipo, ili sukcesas esti savitaj de la Dia providenco. La ŝipo kaj ties valorega ŝarĝo perdiĝos, sed ĉiuj vivoj saviĝos, “eĉ unu haro ne pereos el la kapo al vi ĉiuj” (laŭ 27, 34; Luk 21, 18). Dum nia klopodo por la kristana unueco, nia sindono al la Dia providenco postulos, ke ni lasu flanke multajn aferojn, al kiuj ni estas profunde ligitaj. Gravas al Dio la saviĝo de ĉiuj homoj.

Tia grupo de homoj diversaj kaj konfliktantaj atingas insulon (laŭ 27, 26). Enirintaj kaj enirigitaj en la sama ŝipo, ili atingas la saman destinton, kie ilia humana unueco manifestiĝas per la akceptemo, kiun la loĝantoj de la insulo montras al ili. Unuiĝintaj ĉirkaŭ fajro, ĉirkaŭitaj de popolo kiu ne konas nek komprenas ilin, iliaj diferencoj de potenco kaj sociala klaso forflugas. La 276 homoj ne plu estas dependantaj de indiferentaj fortoj, sed ĉirkaŭataj de la amema providenco de Dio, Kiu montras Sin ĉeestanta pere de popolo, kiu montras al ili “neordinaran bonecon” (laŭ 28, 2). Sentantaj malvarmon kaj malsekaj, ili povas varmiĝi kaj sekiĝi proksime de la fajro. Malsatantaj, ili ricevas manĝaĵon. Oni loĝigas ilin ĝis la vetero donas sekurecon al ili por daŭrigi la vojaĝon.

Nuntempe multaj homoj alfrontas turmentojn similajn sur tiuj samaj maroj. La samaj lokoj menciitaj en la legita teksto (laŭ 27,1; 28,1) ankaŭ apartenas al la historioj de la migrantoj de modernaj jaroj. En aliaj partoj de la mondo multaj aliaj homoj faras vojaĝojn egale danĝerajn surtere kaj surmare por eskapi el naturaj tragedioj, militoj kaj malriĉeco. Iliaj vivoj ankaŭ estas senprotektaj antaŭ nemezureblaj kaj malvarme indiferentaj potencoj – ne nur naturaj, sed ankaŭ politikaj, ekonomiaj kaj homaj. Tiu homa indiferenteco havas plurajn formojn: la indiferenteco de tiuj, kiuj vendas lokojn en neadekvataj barkoj al nepretaj homoj; la indiferenteco kondukanta al la decido ne sendi helpobarkojn; la indiferenteco, kiu forvojaĝigas barkojn kun enmigrantoj. Tiuj ĉi estas nur kelkaj ekzemploj. Kiel kristanoj unuiĝintaj alfrontantaj la krizojn de enmigrado, tiu historio defias nin: ĉu ni apogas la malvarmajn potencojn de indiferenteco aŭ ni montras “neordinaran bonecon” kaj fariĝas atestantoj de la amema providenco de Dio al ĉiuj homoj?

La gastamo estas virto multe bezonata en nia klopodo por kristana unueco. Ĝi estas agado kiu kondukas nin al pli granda malavareco favore al la bezonantoj. La homoj kiuj montris neordinaran bonecon al Paŭlo kaj liaj kunuloj ankoraŭ ne konis Kriston, sed, eĉ en tia kondiĉo, per ilia neordinara boneco la dividiĝinta popolo fariĝas pli kaj pli unuiĝinta. Nia kristana unueco mem estos trovata ne nur per reciproka montrado de gastamo inter unuj kaj aliaj, kvankam tio estas tre grava, sed ankaŭ per amikecaj renkontiĝoj kun tiuj, kiuj ne apartenas al nia lingvo, kulturo aŭ kredo.

En tiaj vojaĝoj tempestaj kaj sporadaj renkontiĝoj, la volo de Dio al la Eklezio kaj al ĉiuj homoj estos plenumita. Laŭ Paŭlo proklamos en Romo, la savado de Dio estas sendata al ĉiuj popoloj (laŭ Ago 28, 28).

LA PREPARO DE LA MATERIALO POR LA PREĜOSEMAJNO POR UNUECO DE LA KRISTANOJ 2020

La kristanaj Eklezioj de Malto estis elektitaj por verki la tekston de la Preĝosemajno por unueco de la kristanoj 2020. La episkopara konferenco de la katolika eklezio, konsistis el arkiepiskopo de Malto Charles J. Scicluna kaj de la episkopo Mario Grech de Gozo, kune kun Christians Together in Malta (temas pri la ekumena konsilio de Malto), atribuis al Mons. Hector Scerri la formadon de loka ekumena grupo kiu povis verki la tekston por la jaro 2020.

Dankesprimon al la episkopa konferenco de la katolika eklezio, al la membroj de Christians Together in Malta, kaj al ĉiuj kiuj, en pluraj manieroj, kontribuis je la redakto de la materialo:

- mons. prof. Hector Scerri – respondeculo kaj kunordinanto de la komitato de redaktado de la teksto komisie de la malta episkopara konferenco, prezidanto de Christians Together in Malta, prezidanto de la dioceza ekumena komisiono (Arkidiocezo de Malto), vicdekano de la Teologia fakultato de malta universitato (katolika);
- s-ino Dorianne Buttigieg – sekretariino de la redakta komitato, membro de la dioceza ekumena komisiono, malta arkidiocezo (katolika);
- rev. Kim Hurst – ministro de la St Andrew’s Scots’ Church, La Valletta, Malto (metodista);
- s-ino Elizabeth Lochhead – membro de la St Paul’s Pro-Cathedral, La Valletta, Malto (angla eklezio);
- mons. Joseph Attard – episkopa vikario por la sekcio laikoj kaj ekumenismo, diocezo de Gozo, Malto (katolika);
- s-ro Norman Alexander – membro de la St Andrew’s Scots’ Church, La Valletta, Malto (skota eklezio); kanoniko Simon Godfrey – kanceliero de la St Paul’s Pro-Cathedral, La Valletta, Malto (angla eklezio); dok-ino Patricia Micallef – kunordinanto de la grupo de Taizè, Malto (katolika); s-ino Judith Pugh – membro de la anglikana komunumo Gozo, Malto (angla eklezio);
- subdiakono Alexander Kuryshev – membro de la rusa ortodoksa paroko de St Paul, Malto (rusa ortodoksa);
- rev. Arkimandrito Nathanael Felesakis – Parokestro de la greka-ortodoksa preĝejo St Paul, Malto (greka-ortodoksa);
- rev. Ionut Iftimia – parokestro de la rumana ortodoksa paroko de St John the Baptist, Malto (rumana ortodoksa);
- s-ro Noel Cauchi – reprezentanto de la luterana evangelia komunumo (komunumo de sankta Andreo), La Valletta, Malto (luterana evangelia);
- rev. dok. Aurelio Mulè Stagno SDB – membro de la ekumena dioceza komisiono, Malto (katolika).

La loka grupo kunsidis ĉe la ĉefa seminario de l’arkiepiskopejo Tal-Virtù, Rabat, Malto, la 12an de februaro, la 15an de marto, la 20an de aprilo kaj la 11an de majo. La materialo kunpreparita de la loka grupo estis prezentita al la internacia komisiono de la reprezentantoj de la papa konsilantaro por la akcelo de la kristana unuiĝo kaj de la ekumena konsilio de la eklezioj. Tiu renkontiĝo okazis ĉe la ĉefa seminarejo sub la respondeco de l’arkiepiskopo en Rabat, Malto, de la 13a ĝis la 18a de septembro 2018; okazis ankaŭ renkontiĝoj kun la loka grupo, kun Christians Together in Malta, kun l’ arkiepiskopo Scicluna kaj kun la arkiepiskopo Alessandro D’Errico, apostola nuncio en Malto.

EKUMENA DISERVO

Enkondukaj notoj:

Malto estas insulo, pro kio ŝipoj havas grandan rolon en la vivo de la maltanoj. En la biblia teksto ni legas pri tia diservo, ĉe la vojaĝo de apostolo Paŭlo, en danĝera maro.

La ŝipo povas esti simbolo por tiu ŝtorma vojaĝo, kiam la kristanoj serĉas la unuecon.

La malta preparat eamo proponas, ke la adorejo estu ŝipo aŭ modelo de ŝipo.

La Agoj de la apostoloj en la Biblio estas ege longaj kaj enhavas multajn nociojn de ŝipado. Tiuj nocioj postulas iom da klarigoj.

Tion oni povas solvi per teatraĵoj, disdoni rolojn kaj prezenti ilin aŭ uzi aliajn similajn rimedojn. La tekston oni povus laŭtlegi proksime de la ŝipforma adorejo.

Por la petoj proponas la malta prepara teamo, ke oni surskribu la petojn sur remioplumo. Sur unuopa remilo oni povus skribi sekvantajn vortojn:

Repaciĝo; iluminaĵo; espero; fido, forto, gastameco, konvertiĝo kaj bonvolemo.

Oni povas jam ĉe la komenco de la Diservo alporti la remilojn al la altaro kaj tie loki, ke oni havu ilin antaŭ la okuloj dum la tuta diservo.

Alia ebleco estas, ke la personoj kiuj legos la porpetojn alvenu al la ambono kun la remiloj.

STRUKTURO DE LA DISERVO

Ili montris al ni neordinaran bonecon (Ago 28,2)

G: Gvidanto
K: Komunumo
L: Leganto

ENIRO

Enira kanto

Dum la kanto, gvidantoj kaj reprezentantoj de la Eklezioj ekeniras por la ekumena kulto de preĝo por la Kristana Unueco. Ili estas gvidataj de partoprenanto kiu tiel portas la Bibliion ke ĉiuj povos vidi ĝin. La Biblio estas metita sur honoran lokon, centre de la komunumo kiu celebras.

AKCEPTEMAJ VORTOJ

G: La graco de Nia Sinjoro Jesuo Kristo, la amo de Dio kaj la kuneco de la Sankta Spirito estu kun ĉiuj.

K: Kaj kun vi ankaŭ.

G: Karaj gefratoj en Kristo, tie ĉi ni kunvenas por preĝi por la unueco inter kristanoj kaj por la repaciĝo en la mondo. Dividoj inter kristanoj ekzistas dum multaj jarcentoj. Tio tre dolorigas kaj kontraŭas la volon de Dio. Ni kredas je la povo de la preĝo. Kune kun kristanoj de la tuta mondo ni oferas niajn preĝojn dum ni strebas superi la apartigon.

La rimedoj por la Semajno de Preĝo por la Unueco Kristana estis pretigitaj de pluraj kristanaj Eklezioj ĉe Malto. La historio de kristanismo en tiu malgranda nacio staranta en insulo devenas de la tempo de la apostoloj. Laŭ la tradicio, Sankta Paŭlo, apostolo de la paganoj, alvenis al la plaĝoj de Malto je la 60-a jaro post Kristo. La priskribo de tiu providenca evento estas al ni komunikitaj en la du lastaj ĉapitroj de la Agoj de la Apostoloj.

La teksto montras la komencon de kristanismo en Malto – malgranda lando formita de du ĉefaj insuloj kun loĝantaro – Malto kaj Gozo, kiel same kun aliaj insuloj malpli grandaj – en la koro de la mediteranea maro, survoje inter la suda parto de Sicilio kaj la nordo de Afriko. Tiu biblia tero staras ĉe spaco de renkonto de civilizoj, kulturoj kaj religioj.

Niaj preĝoj kaj meditoj, hodiaŭ, kaj dum la Semajno de Preĝo por la Unueco Kristana de tiu ĉi jaro, centriĝas sur la gastigo elmontrita de la loĝantaro de la insulo rilate al tiuj alvenintaj de suferiga ŝipdroneo. Estas nia devizo: Ili montris al ni neordinaran bonecon (vd. Ago 28,2). Ni deziras ke la amo kaj respekto kiujn ni montros unuj kun aliaj hodiaŭ dum ni preĝas por la unueco kristana, akompanu nin dum tuta la jaro.

ALVOKO AL LA SANKTA SPIRITO

La respondo al ĉiu preĝo povas esti kantata de unu kantisto kaj ripetata de tuta kunveno.

G: Spirito de amo, venu sur tiun ĉi kunvenon kaj loĝu en ni.

K: Venu, Sankta Spirito (aŭ: Veni Sancte Spiritus!)

G: Spirito de unueco, montru al ni la vojon por la kristana unueco.

K: Venu, Sankta Spirito (aŭ: Veni Sancte Spiritus!)

G: Spirito de gastameco, instruu nin esti akceptemaj.

K: Venu, Sankta Spirito (aŭ: Veni Sancte Spiritus!)

G: Spirito de kompatato, inspiru en ni sintenon de respekto rilate al ĉiuj kiujn ni renkontas.

K: Venu, Sankta Spirito (aŭ: Veni Sancte Spiritus!)

G: Spirito de espero, helpu nin eltiri ĉion kion forigas nin el nia ekumena irado.

K: Venu, Sankta Spirito (aŭ: Veni Sancte Spiritus!)

PREĜOJ DE PARDONO KAJ REPACIĜO

La respondo al ĉiu preĝo povas esti kantata de unu kantisto kaj ripetita de tuta kongregacio.

G: Pardonu al ni, Sinjoro, la pasintajn erarojn, malfidojn kaj erarintajn kondutojn inter kristanoj de diversaj eklezioj kaj tradicioj.

K: Sinjoro, kompatu nin (aŭ Kyrie eleison!)

G: Pardonu al ni, Sinjoro, restadi en mallumo, anstataŭ serĉi la vojon de la Lumo, ĉar vi, Sinjoro, estas la ununura vera Lumo.

K: K: Sinjoro, kompatu nin (aŭ Kyrie eleison!)

D: Pardonu al ni, Sinjoro, nian mankon de kredo kaj foreston esti homoj de esperema atendo kaj aŭtentika karitato.

K: K: K: Sinjoro, kompatu nin (aŭ Kyrie eleison!)

G: Pardonu nin, Sinjoro, ĉar ni kaŭzis doloron, malfacilaĵojn kaj angoron al aliaj.

K: Sinjoro, kompatu nin (aŭ Kyrie eleison!)

G: Pardonu nin, Sinjoro, ĉar ni izoligis kaj restis indiferentaj, anstataŭ montri gastamecon al ĉiuj, ĉefe fremduloj kaj rifuĝintoj.

K: Sinjoro, kompatu nin (aŭ Kyrie eleison!)

G: Favorkora kaj kompatema estas la Eternulo, longetolerema kaj tre bona. Ĉar kiel alte estas la ĉielo super la tero, tiel granda estas Lia boneco por tiuj kiuj Lin timas. Kiel malproksime estas la oriento de la okcidento, tiel Li malproksimigis de ni niajn pekojn (Vd. Ps 103, 8.11-12).

K: Amen.

LAŬDA KANTO

G: Ĉiela Patro, malfermu niajn korojn kaj mensojn per via Vorto.

K: Via Vorto estas spirito kaj vivo!

G: Kreskigu nin, ĉiam pli proksimaj unuj al la aliaj en unueco kaj karitato.

K: Via Vorto estas lampo en nia vojo!

LEGAĴOJ

Unua legaĵo: Ago 27,18 - 28,10

L: Tiu ĉi estas la Vorto de la Sinjoro.

K: Ni dankas Dion, kiu savas kaj kuracas.

Psalmo 107, 8-9.19-22.28-32

Ili gloru la Eternulon por Lia boneco,
Kaj por Liaj mirakloj antaŭ la homidoj.
Ĉar Li satigis animon soifantan,
Kaj animon malsatan Li plenigis per bonaĵo. –

K: La Sinjoro liberigis nin el la tempestoj.

Sed ili ekkriis al la Eternulo en sia sufero,
Kaj Li liberigis ilin el ilia mizero.
Li sendis Sian vorton,
Kaj Li sanigis ilin kaj savis ilin de la tombo.
K: La Sinjoro liberigis nin el la tempestoj.

Ili gloru la Eternulon por Lia boneco,
Kaj por Liaj mirakloj antaŭ la homidoj.
Kaj ili oferdonu dankajn oferojn,
Kaj rakontu Liajn farojn kun kantado.
K: La Sinjoro liberigis nin el la tempestoj.

Sed ili ekkriis al la Eternulo en sia sufero,
Kaj Li eligis ilin el ilia mizero.

Li kvietigis la ventegon,
Kaj ĝiaj ondoj silentiĝis.

K: La Sinjoro liberigis nin el la tempestoj.

Kaj ili ekĝojis, kiam fariĝis silente;
Kaj Li alkondukis ilin al la dezirata haveno.
Ili gloru la Eternulon por Lia boneco,
Kaj por Liaj mirakloj antaŭ la homidoj.
Kaj ili altigu Lin en popola kunveno,
Kaj en kunsido de plejaĝuloj ili Lin laŭdu.

K: La Sinjoro liberigis nin el la tempestoj.

Aklamo de Haleluja povas esti kantata antaŭ (kaj post) la legaĵo de la Evangelio.

Evangelio: Mar 16, 14-20

Poste li aperis al la dek unu, dum ili sidis ĉe manĝo, kaj riproĉis ilian nekredemon kaj korobstinon, ĉar ili ne kredis tiujn, kiuj vidis lin leviĝintan.

Kaj li diris al ili: Iru en la tutan mondon, kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĵo. Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita; sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita. Kaj jenaj signoj sekvos la kredantojn: en mia nomo ili elpelos demonojn; ili parolos per lingvoj; ili prenos en manojn serpentojn, kaj se ili trinkos ion mortigan, ĝi neniel difektos ilin; sur malsanulojn ili metos la manojn, kaj ili saniĝos.

Tiam la Sinjoro Jesuo, post kiam li parolis al ili, estis ricevita supren en la ĉielon, kaj sidiĝis dekstre de Dio. Kaj elirinte, ili predikis ĉie, kaj la Sinjoro laboris kun ili kaj fortikigis la vorton per la signoj, kiuj sekvis.

G: Tiu ĉi estas la Vorto de la Sinjoro.

K: Laŭdon al Vi, Sinjoro Jesuo Kristo. Vi estas la Bona Novaĵo!

Sekve oni faras biblian mediton aŭ mallongan homilion.

KREDO-KONFESO

G: Karaj gefratoj, ĉar ni estas kunvenitaj en la Sinjoro Jesuo Kristo, ni proklamos nian kredon komunan je unu nura Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito.

**K: Mi kredas je Dio, la Patro ĉiopova,
la kreinto de la ĉielo kaj de la tero;
kaj je Jesuo Kristo,**

**Lia unu-nura Filo, nia Sinjoro,
koncipita per la Sankta Spirito,
naskita el Maria la Virgulino,
suferinta sub Poncio Pilato,
krucumita, mortinta kaj entombigita,
sobirinta en la regnon de la morto.**

**La trian tagon Li releviĝis el la mortintoj,
supren-iris al la ĉielo,
sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova,
de kie Li venos, por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.
Mi kredas je la Sankta Spirito,**

**la sankta katolika* eklezio,
la komuno de la sanktuloj,
la pardono de la pekoj,
la releviĝo de la mortintoj,
kaj la vivo eterna. Amen.**

PREĜOJ DE LA KOMUNUMO

Dum la preĝoj, ok remiloj (aŭ bildoj remilformaj) estas kondukita al la kunveno pere de membroj de diversaj komunumoj. Ĉiu remilo portas ununuran vorton: Repaciĝo, Iluminaĵo, Espero, Fido, Forto, Gastameco, Konvertiĝo kaj Bonvolemo. La prezento de ĉiu remilo enkondukas ĉiun el la petoj. Post leviĝo, ĉiu remilo estas metita apud aŭ en la boaton, kaj oni faras momenton de silenta preĝo. Leganto tiam anoncas la respondan peton, kaj ĉiuj en la kunveno respondas.

G: Ni ne povas alfronti solaj la tempestojn de la vivo. Boato antaŭeniras kiam ni remas kune. Antaŭ la malfacilaĵoj ni agnoskas la neceson antaŭeniri kune kaj unuigi niajn klopodojn. Ni preĝu.

Dum momento de silenta preĝo de la kunsido, la unua remilo (Repaciĝo) estas portata antaŭen. La samo okazos pri la aranĝado de la aliaj remiloj.

L: Malavara Dio, kuracu la dolorigajn memorojn de nia pasinteco, kiuj vundis niajn Ekleziojn kaj daŭrigas apartigi nin.

K: Aŭdu nian preĝon per la Repaciĝo.

L: Malavara Dio, instruu nin firmigi nian vojiradon en Kristo, la Vera Lumo.

K: Aŭdu nian preĝon per la Iluminaĵo.

L: Malavara Dio, fortigu nian fidon en via providenco, kiam ni sentas nin minacitaj de la tempestoj de la vivo.

K: Aŭdu nian preĝon per la Espero.

L: Malavara Dio, aliformigu niajn multajn disiĝojn pri harmonio kaj nian malfidon pri reciproka akceptado.

K: Aŭdu nian preĝon per la Fido.

L: Malavara Dio, donu al ni kuraĝon paroli la veron kun justeco kaj en la amo.

K: Aŭdu nian preĝon per la Fortikigo.

L: Malavara Dio, disbatu la barojn, videblajn kaj nevideblajn, kiuj malpermesas nin akcepti niajn gefratojn kiuj estas en danĝero aŭ bezonas helpon.

K: Aŭdu nian preĝon per la Gastameco.

L: Malavara Dio, transformu niajn korojn kaj la korojn de niaj kristanaj komunumoj, por ke ni povu esti agantoj de via kuracado.

K: Aŭdu nian preĝon per la Konvertiĝo.

L: Malavara Dio, malfermu niajn okulojn por vidi la kunecon de la kreitaro kiel donacon vian, kaj niajn manojn por solidarece partigi ĝiajn fruktojn.

K: Aŭdu nian preĝon per la Bonvolemo.

LA PREĜO DE LA SINJORO

G: Unuigitaj en Jesuo Kristo, ni preĝas kune kiel Li instruis nin.

K: Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu via nomo, venu via regno, fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ, kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj, kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Amen.

G: La popolo de Malto akceptis Paŭlon kaj liajn kunulojn per neordinara bonvolemo. Ni salutu nin reciproke, partigante la pacon kiu estas donaco de Kristo por ni.

NI ESTAS SENDITAJ KUNE POR PROKLAMI LA BONAN NOVAĴON

G: Ni estas unuigitaj kiel kristanoj kaj, do, kiel disĉiploj kunuloj. Ĉar ni sopiras la kristanan unuecon, ni denove devontigu nin labori por tiu komuna celo.

Paŭzo por silenta preĝo.

La gvidantaro de la Eklezioj, kiuj ĉeestos, unuigas sin por proklami la preĝon por la beno.

G: Ke Dio Patro, kiu vokis nin de la mallumo al la lumo, faru nin veraj portantoj de la lumo de Dio.

K: Amen.

G: Ke Dio Filo, kiu per sia altvalora sango elaĉetis nin, fortigu nin por sekvi Lian ekzemplon, servante al la aliaj.

K: Amen.

G: Ke Dio, Sankta Spirito, kiu estas Sinjoro kaj donacanto de vivo, fortigu nin por alfronti la ŝipdronojn de la vivo kaj alveni al la plaĝoj de la savo.

K: Amen.

G: Ke la Ĉiopova kaj malavara Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito, benu nin kaj nin protektu nun kaj por ĉiam.

K: Amen.

K: Ni unuiĝu por proklami la mirindaĵojn de la Dia amo.

Amen! Amen! Amen!

HIMNO POR FERMI LA DISERVON

Nekutima Boneco

Joe C Aquilina, Malto, 2018.

https://www.youtube.com/watch?v=bRB4_CjuHy8

Fajron bruligu,
fajron konstruu,
en la koroj de homoj,
junaj, maljunaj.
Fajron bruligu,
fajron konstruu,
mallumiĝas,
malvarmiĝas!

Ne tie restu,
vian zorgon vi montru,
ne tie restu,
eliru, kundividu,
ne tie restu,
eliru, servu
al la popoloj de la mond'.

Kaj la popoloj de la mond'
eble iam ĝoje kantos
pri la amo al ili montrita en la nomo
de Jesu'.

Ili montris nekutiman bonecon al ni.
Veran zorgon pri ni ili montris.
Ili montris nekutiman bonecon al ni,
ĉiufoje kaj ĉie.

Ili montris nekutiman bonecon al ni.
Ili donis helpon al ni.
Ili montris nekutiman bonecon al ni
en ĉiuj landoj ĉie.

Ĉi-kanton ni ne meritas,
Kyrie eleison,
ne tiel fortas nia am',
Kyrie eleison.

Helpu nin preterleviĝi,
Kyrie eleison,
preter vortoj por lasi ke la fajro de via
am'
ŝanĝu niajn korojn.

Fajron bruligu,
fajron konstruu,
en la koroj de homoj,
junaj, maljunaj.
Fajron bruligu,
fajron konstruu,
mallumiĝas,
malvarmiĝas!

Ne tie restu,
vian zorgon vi montru,
ne tie restu,
eliru, kundividu,
ne tie restu,
eliru, servu
al la popoloj de la mondo.

En Lia amo ni trempitis,
En Lia graco ni trovis forton,
Potencfonton ni trovis en Lia
kompatemo.

Li montris nekutiman bonecon al ni.
Li montris, ke Li vere zorgas.
Li montris nekutiman bonecon al ni
ĉiufoje kaj ĉie,
por ke nekutiman bonecon ni montru
kaj donu helpon
por nekutiman bonecon montri
en ĉiuj landoj ĉie.

TAGO UNUA
Repaciĝo – forĵeti la ŝarĝojn

Ago 27,18-19,21

Kaj kiam ni estis treege premataj de la ventego, la sekvantan tagon ili komencis elĵetadon; kaj la trian tagon oni elĵetis per siaj propraj manoj la ekipaĵon de la ŝipo.

Kaj kiam ili jam de longe nenion manĝis, Paŭlo, stariĝinte meze de ili, diris: Ho viroj, vi devis aŭskulti min, kaj ne ŝipiri el Kreto, kaj ne suferi ĉi tiun difekton kaj perdon.

Psalmo 85

Vi korfavoris, ho Eternulo, Vian landon,
Vi revenigis la forkaptitojn de Jakob;
Vi pardonis la kulpon de Via popolo,
Vi kovris ĉiujn ĝiajn pekojn.

Vi retenis Vian tutan koleron,
Forlasis Vian furiozon.
Turnu Vin al ni, ho Dio de nia savo,
Kaj ĉesigu Vian koleron kontraŭ ni.

Ĉu eterne Vi nin koleros,
Daŭrigos Vian koleron de generacio al generacio?
Ĉu Vi ne revivigos nin denove,
Ke Via popolo ĝoju per Vi?
Aperigu al ni, ho Eternulo, Vian favoron,
Kaj Vian helpon donu al ni.

Mi aŭdu, kion diras Dio, la Eternulo;
Ĉar Li deklaras pacon al Sia popolo kaj al Siaj fideluloj,
Ke ili ne reiru al malsaĝeco.
Jam proksima estas Lia helpo al tiuj, kiuj Lin timas,
Por ke ekregu honoro en nia lando.

Bono kaj vero renkontiĝas,
Justeco kaj paco sin kisas.
Vero elkreskas el la tero,
Kaj justeco rigardas el la ĉielo.

Kaj la Eternulo donos bonon,
Kaj nia tero donos siajn produktojn.
Justeco iros antaŭ Li
Kaj faros vojon por Liaj paŝoj.

Luk 18,9-14

Kaj li parolis la jenan parabolon, ankaŭ por iuj, kiuj fidis al si, ke ili estas justuloj, kaj malestimis la ceterajn: Du homoj supreniris en la templon, por preĝi; unu estis Fariseo, kaj la alia estis impostisto. La Fariseo, starante, preĝis kun si jene: Ho Dio, mi Vin dankas, ke mi ne estas kiel la ceteraj homoj, rabemaj, maljustaj, adultemaj, nek eĉ kiel ĉi tiu impostisto. Mi

fastas dufoje en semajno; mi donas dekonaĵojn el ĉio, kion mi akiras. Sed la impostisto, starante malproksime, ne volis eĉ levi la okulojn al la ĉielo, sed batadis sian bruston, dirante: Ho Dio, estu favora al mi pekulo. Mi diras al vi: Ĉi tiu malsupreniris al sia domo, pravigita pli ol tiu; ĉar ĉiu, kiu sin altigas, estos humiligita; sed kiu sin humiligas, tiu estos altigita.

Medito

Estante kristanoj el diversaj eklezioj kaj tradicioj ni, en la kuro de la jarcentoj, bedaŭrinde kolektis multe da ŝarĝo. Ĝi konsistas el reciprokaj envio, amaro kaj suspekto. Dankas ni la Sinjoron por la estiĝo kaj la kresko de la ekumena movado dum la pasinta jarcento. Niaj renkontiĝoj kun kristfideluloj el malsamaj tradicioj kie ankaŭ nia komuna preĝado por la unueco de la kristanoj kuraĝigas nin ke petu unu la alian pri pardondono, ke serĉatu la repaciĝo, ke zorgu unu pri la alia bone. Ni ne rajtas permesi ke la malagrablaj pasintaj malhelpoj nin en la komuna alproksimiĝo. Dio ja volas ke, pro Li, ni forpelu tion, kio premadas de ambaŭ flankoj.

Preĝo

Ho Dio ĉiam preta je pardono.

Liberigu nin el la doloraj memoroj je la estinto
kiuj vundas nian komunan vivon kiel kristanoj.

Konduku nin sur la vojon de repaciĝo
por ke ni en la povo de la Sankta Spirito
venku la malamon per amo, la koleron per mildo,
la suspekton per konfido.

Por tio ĉi ni petas vin
en la nomo de Via amata filo
kaj nia frato Jesuo Kristo. Amen.

TAGO DUA
Illuminaĵo: Serĉi kaj montri la lumon de Kristo.

Ago 27, 20

Kaj kiam dum multe da tagoj nek suno nek steloj ekbrilis sur nin, kaj uragano nemalgranda ĉirkaŭis nin, fine ĉia espero pri nia savo estis forprenita.

Psalmo 119 [118], 105-110

Via vorto estas lumilo por miaj piedoj,
Kaj lumo por mia vojo.
Mi ĵuris, kaj mi plenumos:
Observi Viajn justajn decidojn.

Mi estas tre senfortigita, ho Eternulo;
Vivigu min, konforme al Via vorto.
La oferdono de mia buŝo plaĉu al Vi, ho Eternulo,
Kaj pri Viaj decidoj instru min.

Mia animo estas ĉiam en mia mano,
Sed Vian instruon mi ne forgesas.
La malvirtuloj metis reton por mi;
Sed de Viaj ordonoj mi ne dekliniĝis.

Mar 4, 35-41

Kaj en tiu tago, kiam vesperiĝis, li diris al ili: Ni transiru al la alia bordo. Kaj forsendinte la homamason, ili kondukis lin kun si, kiel li estis en la ŝipeto. Kaj aliaj ŝipetoj akompanis lin. Kaj okazis granda ventego, kaj ondoj batis en la ŝipeton, tiel ke la ŝipeto estis jam pleniĝanta. Kaj li estis dormanta en la posta parto sur la kuseno; kaj ili vekis lin, kaj diris al li: Majstro, ĉu vi ne zorgas pri tio, ke ni pereas? Kaj vekite, li admonis la venton, kaj diris al la maro: Silentu, kvietiĝu. Kaj la vento ĉesiĝis, kaj fariĝis granda sereno. Kaj li diris al ili: Kial vi estas timemaj? ĉu vi ankoraŭ ne havas fidon? Kaj ili timis treege, kaj diris unu al alia: Kiu do estas ĉi tiu? ĉar eĉ la vento kaj la maro obeas al li.

Medito

Kristo estas nia lumo kaj nia gvidanto. Sen la lumo kaj gvidado de Kristo, ni malorientiĝis. Kiam la kristanoj perdas la lumon de Kristo ili iĝas timemaj kaj divido aperis inter ili. Plie, multaj bonvolaj homoj ekstere de la Eklezio ne povas vidi la lumon de Kristo, ĉar la divido inter la kristanoj malpli klare reflektas ĉi-tian lumon, aŭ eĉ tute blokis ĝin. Serĉante la lumon de Kristo, ni alproksimiĝas unu al la alia, kaj tiel ni reflektadas ĉi-tian lumon pli klare; ni do vere fariĝas signo de Kristo, la Lumo de la Mondo.

Preĝo

Ho Dio, Via Vorto estas lumo por niaj paŝoj,
sen Vi, ni estas perditaj kaj malorientiĝintaj.
Lumigu nin, por ke mi povu iri sur Via vojo,
pere de Via Vorto.
Niaj Eklezioj soifu por Via gvidanta,
konsolanta kaj transformanta ĉeesto.

Donu al ni la honestecon, kiun ni bezonas, por ekscii,
kiam ni malfaciligas al la aliaj la vidon de Via lumo,
kaj la gracon, kiun ni bezonas por disdoni Vian lumon al la aliaj.
Mi petas tion en la nomo de Via Filo,
kiu vokas nin, Siajn disĉiplojn, esti la lumo de la mondo. Amen.

TAGO TRIA
Espero: La mesaĝo de Paŭlo

Ago 27, 22.34

Kaj nun mi admonas vin esti kuraĝaj; ĉar estos neniu perdo de vivo inter vi, sed nur de la ŝipo. Tial mi petas vin preni nutraĵon, ĉar ĉi tio koncernas vian savon; ĉar eĉ unu haro ne pereos el la kapo al vi ĉiuj.

Psalmo 27 [26], 1-14

La Eternulo estas mia lumo kaj mia savo; kiun mi devas timi?
La Eternulo estas la forto de mia vivo; kiu povas min teruri?
Kiam alproksimiĝos al mi malbonfarantoj, por manĝi mian karnon,
Miaj kontraŭuloj kaj malamikoj, ili surpuŝiĝos kaj falos.

Se elpaŝos kontraŭ min armeo,
Mia koro ne ektimos;
Se leviĝos kontraŭ min milito,
Ankaŭ tiam mi havos fidon.

Nur unu aferon mi petas de la Eternulo, nur tion mi deziras:
Ke mi restu en la domo de la Eternulo en la daŭro de mia tuta vivo,
Por rigardi la ĉarmon de la Eternulo, admiri Lian templon.
Ĉar Li kovros min en Sia kabano en la tago de malbono;
Li kaŝos min en sekreta loko de Sia tendo;
Sur rokon Li levos min.

Kaj nun leviĝos mia kapo super miajn malamikojn, kiuj min ĉirkaŭas;
Kaj mi oferfaros en Lia tendo oferojn de danko;
Mi kantos kaj gloros la Eternulon.

Aŭskultu, ho Eternulo, mian voĉon, kiam mi vokas;
Korfavoru min, kaj respondu al mi.
De Vi diris al mi mia koro: Serĉu Mian vizaĝon.
Vian vizaĝon, ho Eternulo, mi serĉas.

Ne kaŝu antaŭ mi Vian vizaĝon,
Ne forpuŝu en kolero Vian sklavon; Vi estis mia helpo,
Ne forpuŝu kaj ne forlasu min, ho Dio de mia savo.
Ĉar mia patro kaj mia patrino min forlasis,
Sed la Eternulo min akceptis.

Instruu al mi, ho Eternulo, Vian vojon,
Kaj konduku min sur ĝusta irejo, spite miajn insidantojn.
Ne fordonu min al la volo de miaj premantoj;
Ĉar stariĝis kontraŭ mi falsaj atestantoj, plenaj de rabemeco.
Se mi ne esperus vidi la bonecon de la Eternulo
En la lando de vivantoj!

Esperu al la Eternulo;
Tenu vin forte, forta estu via koro;
Jes, esperu al la Eternulo.

Mat 11, 28-30

Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj, kaj mi vin ripozigos. Metu sur vin mian jugon, kaj lernu ĉe mi, ĉar mi estas milda kaj korhumila; kaj vi trovos ripozon por viaj animoj. Ĉar mia jugo estas facila, kaj mia ŝarĝo estas malpeza.

Medito

Kiel kristanoj apartenantaj al eklezioj kaj tradicioj ne komplete repaciĝintaj unu kun la alia, ni ofte estas seniluziigitaj pro la manko de progreso al videbla unueco. Vere, iuj rezignis ĉiun esperon kaj vidas ĉi tiun unuecon kiel neatingeblan idealon. Aliaj eĉ ne vidas unuecon kiel necesan parton de sia kristana fido. Dum ni preĝas por ĉi tiu donaco de videbla unueco, ni faru tion kun firma fido, pacienco kaj atendantanta espero, fidante la aman providencon de Dio. Unueco estas la Preĝo de la Sinjoro por la Eklezio kaj li akompanas nin en ĉi tiu vojaĝo. Ni ne perdiĝos.

Preĝo

Dio de mizerikordo,
ni perditaj kaj senkuraĝigitaj turnas nin al vi.
Enigu en nin vian donacon de espero.
Niaj eklezioj esperu kaj strebu por la unueco,
por kiu via Filo preĝis antaŭ la pasiono.
Ni petas tion per li,
kiu vivas kaj reĝas kun vi
kaj la Sankta Spirito por ĉiam kaj eterne. Amen.

TAGO KVARA
Fido: Ne timu, kreu

Ago 27, 23-26

Ĉar en tiu nokto staris apud mi anĝelo de la Dio, kies mi estas kaj al kiu mi servas, dirante: Paŭlo, ne timu; vi devas stari antaŭ Cezaro; kaj jen Dio donacis al vi ĉiujn, kiuj marveturas kun vi. Tial, viroj, kuraĝu; ĉar mi kredas al Dio, ke la afero estos tiel, kiel estas dirite al mi. Tamen ni devas esti ĵetitaj sur ian insulon.

Psalmo 56 [55], 2-14

Korfavoru min, ho Dio, ĉar homo volas min engluti,
Dum la tuta tago malamiko min premas.
Miaj malamikoj volas min engluti ĉiutage,
Ĉar multaj militas kontraŭ mi fiere. –

En la tago, kiam mi timas,
Mi fidas Vin.
Dion, kies vorton mi gloras,
Tiun Dion mi fidas; mi ne timas:
Kion karno faros al mi?

Dum la tuta tago ili atakas miajn vortojn;
Ĉiuj iliaj pensoj pri mi estas por malbono.
Ili kolektiĝas, embuskas, observas miajn paŝojn,
Penante kapti mian animon.

Por ilia malbonago repagu al ili,
En kolero faligu la popolojn, ho Dio!
Mian vagadon Vi kalkulis;
Metu miajn larmojn en Vian felsakon,
Ili estas ja en Via libro.
Tiam miaj malamikoj returniĝos malantaŭen en la tago, kiam mi vokos;
Tion mi scias, ke Dio estas kun mi.

Mi gloros vorton de Dio;
Mi gloros vorton de la Eternulo.
Dion mi fidas, mi ne timas:
Kion faros al mi homo?

Mi faris al Vi, ho Dio, promesojn,
Mi plenumos al Vi dankoferojn.
Ĉar Vi savis mian animon de la morto,
Kaj miajn piedojn de falpuŝiĝo,
Por ke mi iradu antaŭ Dio
En la lumo de la vivo.

Luk 12, 22-34

Kaj li diris al siaj disĉiploj: Tial mi diras al vi: Ne zorgu pri via vivo, kion vi manĝu; nek pri via korpo, kion vi surmetu. Ĉar la vivo estas pli ol nutraĵo, kaj la korpo pli ol vestaĵo. Pripensu la korvojn, ke ili ne semas, nek rikoltas, kaj ne havas provizejon nek grenejon; kaj Dio nutras ilin; kiom pli vi valoras, ol la birdoj! Kaj kiu el vi per zorgado povas aldoni unu ulnon al sia staturo? Se do vi ne povas fari eĉ la plej malgrandan aferon, kial vi zorgas pri la ceteraj? Pripensu la liliojn, kiel ili kreskas; ili ne laboras, nek ŝpinas; tamen mi diras al vi: Eĉ Salomono en sia tuta gloro ne estis ornamita tiel, kiel unu el ĉi tiuj. Sed se Dio tiel vestas la kampan herbaĵon, kiu hodiaŭ ekzistas, kaj morgaŭ estos ĵetata en fornon, kiom pli certe Li vestos vin, ho malgrandfiduloj! Kaj ne serĉu, kion vi manĝos, kaj kion vi trinkos, kaj ne estu dubemaj. Ĉar pri ĉio tio serĉas la nacioj de la mondo; sed via Patro scias, ke vi tion bezonas. Sed celu Lian regnon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi. Ne timu, malgranda gregoj; ĉar bone plaĉis al la Patro doni al vi la regnon. Vendu viajn posedaĵojn, kaj donu almozon; faru por vi monujojn, kiuj ne fariĝos malnovaj, trezoron ne mankontan en la ĉielo, kie ŝtelisto ne alproksimiĝas kaj tineo ne detruas. Ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro.

Medito

Dum la ŝtormo furiozas, la instigo kaj espero de Paŭlo kontraste interkruciĝas kun timo kaj malespero de liaj kunuloj. Nia komuna alvoko esti disĉiploj de Jesuo Kristo implicas, ke ni estas unu signo de kontraŭdiro. En mondo ŝirita de maltrankvilo, ni estas vokitaj esti atestantoj de la espero, memfida je la amanta providenco de Dio. La kristana sperto montras al ni, ke Dio skribas rekte kaj kurbe, kaj ke ni povu daŭre esperi kontraŭ ĉiaj probablecoj, sciante, ke ni ne perdos nin. La persista amo de Dio daŭras eterne.

Preĝo

Ĉiopova Dio,
per nia persona sufero ni krias nian doloron
kaj ni tremas pro malsano, maltrankvilo,
aŭ la morto de amato.
Instruu nin konfidi vin.
Faru niajn ekleziojn signoj de via providenca zorgemo.
Faru nin veraj disĉiploj de via Filo
kiu instruis nin aŭskulti vian vorton
kaj servi unu al la alia.
Kun konfido, ni petas vin en la nomo de via Filo,
kaj per la potenco de la Sankta Spirito. Amen.

TAGO KVINA
Forto: dispecigi la panon por la vojaĝo

Ago 27, 33-36

Sed ĝis venis la tagiĝo, Paŭlo petis ĉiujn, ke ili prenu iom da nutraĵo, kaj li diris: La nuna tago estas la dek-kvara, en kiu vi daŭre atendas kaj fastadas, preninte nenion. Tial mi petas vin preni nutraĵon, ĉar ĉi tio koncernas vian savon; ĉar eĉ unu haro ne pereos el la kapo al vi ĉiuj. Kaj dirinte tion kaj preninte panon, li donis dankon al Dio antaŭ ĉiuj; kaj dispeciginte ĝin, li komencis manĝi. Tiam ili ĉiuj kuraĝiĝis, kaj ankaŭ mem prenis nutraĵon.

Psalmo 77 [76], 2-21

Mia voĉo iras al Dio, kaj mi krias;
Mia voĉo iras al Dio, ke Li aŭskultu min.
En la tago de mia suferado mi serĉas mian Sinjoron;
En la nokto mia mano estas etendita kaj ne malleviĝas;
Mia animo ne volas konsoliĝi.

Mi rememoras Dion, kaj mi ĝemas;
Mi meditas, kaj mia spirito malĝojas.
Vi retenas la palpebrojn de miaj okuloj;
Mi estas frapita, mi ne povas paroli.

Mi meditas pri la tagoj antikvaj,
Pri la jaroj antaŭlonge pasintaj.
Mi rememoras en la nokto mian kanton;
Mi parolas kun mia koro,
Kaj mia spirito esploras.

Ĉu por eterne mia Sinjoro forpuŝis?
Kaj ĉu Li ne plu favoros?
Ĉu por eterne ĉesiĝis Lia boneco?
Ĉu Lia promeso ne plenumiĝos por ĉiuj generacioj?
Ĉu Dio forgesis indulgi?
Ĉu Li fermis en kolero Sian favorkorecon?

Kaj mi diris: Tio estas mia aflikto,
Ke aliiĝis la dekstra mano de la Plejaltulo.
Mi rememoros la farojn de la Eternulo;
Jes, mi rememoros Viajn antikvajn miraklojn.
Mi meditos pri ĉiuj Viaj faroj,
Kaj pri Viaj agoj mi parolos.

Ho Dio, en sankteco estas Via vojo;
Kiu estas tiel granda dio, kiel nia Dio?
Vi estas tiu Dio, kiu faras miraklojn;
Vi montris Vian forton inter la popoloj.
Vi liberigis per Via brako Vian popolon,
La filojn de Jakob kaj Jozef.

Vidis Vin akvoj, ho Dio, Vidis Vin akvoj, kaj ili ekstremis,
Kaj abismoj skuiĝis.
Nubegoj verŝis akvon,
La ĉielo eligis bruon,
Kaj Viaj sagoj ekflugis.

La voĉo de Via tondro estis en la turnovento,
Fulmoj lumigis la mondon;
Tremis kaj ŝanceliĝis la tero.

Sur la maro estis Via vojo,
Kaj Via irejo sur grandaj akvoj,
Sed Viaj paŝosignoj ne estis videblaj.
Vi kondukis Vian popolon kiel ŝafojn,
Per la mano de Moseo kaj Aaron.

Mar 6, 30-44

Kaj la apostoloj kolektiĝis al Jesuo, kaj rakontis al li ĉion, kion ili faris kaj instruis. Kaj li diris al ili: Venu mem aparte en dezertan lokon, kaj iom ripozu. Ĉar estis multaj venantaj kaj irantaj, kaj ili ne havis oportunon eĉ por manĝi. Kaj ili foriris en la ŝipeto al dezerta loko aparte. Kaj oni vidis ilin forirantajn, kaj multaj rekons ilin, kaj piede oni kuris tien el ĉiuj urboj kaj antaŭvenis ilin. Kaj li elvenis, kaj vidis grandan homamason, kaj li kortuŝiĝis pri ili, ĉar ili estis kiel ŝafoj ne havantaj paŝtiston; kaj li komencis instrui al ili multon.

Kaj kiam la horo jam estis malfrua, liaj disĉiploj venis al li, kaj diris: La loko estas dezerta, kaj la horo estas jam malfrua; forsendu ilin, por ke ili iru en la ĉirkaŭajn kampojn kaj vilaĝojn kaj aĉetu por si manĝaĵon. Sed li responde diris al ili: Vi donu al ili manĝi. Kaj ili diris al li: Ĉu ni iru kaj aĉetu panojn por ducent denaroj, kaj donu al ili manĝi? Kaj li diris al ili: Kiom da panoj vi havas? iru, por vidi. Kaj sciiĝinte, ili diris: Kvin, kaj du fiŝojn. Kaj li ordonis al ili, ke ĉiuj sidiĝu laŭgrupe sur la verda herbo. Kaj ili sidiĝis en aroj, centope kaj kvindekope. Kaj li prenis la kvin panojn kaj la du fiŝojn, kaj suprenrigardinte al la ĉielo, li benis kaj dispecigis la panojn, kaj donis al la disĉiploj, por meti antaŭ ilin; kaj li dividis la du fiŝojn inter ĉiuj. Kaj ĉiuj manĝis kaj satiĝis. Kaj oni kolektis da fragmentoj dek du korbojn, kaj ankaŭ el la fiŝoj. Kaj tiuj, kiuj manĝis la panojn, estis kvin mil viroj.

Medito

La invito de Paŭlo manĝi estas instigo al tiuj, kiuj surŝipe estas, fortiĝi por tio, kio okazos. Tiu ĉi panpreno signas ŝanĝon je sinteno, ĉar tiuj, kiu surŝipe estas, transiras el senespero al kuraĝo. Simile, eŭĥaristio aŭ Manĝo de la Disinjoro nin provizas je pano por la vojaĝo kaj nin reorientigas al la vivo en Dio. Tio donas al ni forton. La dispecigo de la pano- kio estas je la bazo de de la vivo kaj la kulto de la kristana komunumo-nin edifas, dum ni engaĝas nin al la kristana servo. Sopiras nin la tagon, kiam ĉiuj kristanoj povos dividi la tablon de la Manĝo de la Disinjoro kaj fortiĝi per sama pano kaj sama kaliko.

Preĝo

Dio je amo, Via filo Jesuo Kristo dispecigis la panon
kaj dividis la kalikon kun siaj amikoj la antaŭtago de Sia Pasiono.
Povu ni kreski en komunio.

Sekvante la ekzemplon je Paŭlo kaj la unuaj kristanoj,
fortigu nin por konstruado de pontoj ke kompato,
solidareco kaj harmonio.
Per la povo de la Sankta Spirito,
ĉi tion ni petas en la nomo de Via Filo,
kiu sian vivon transdonas,
por ke vivon ni havu. Amen.

TAGO SESA
Gastameco: Montru nekutiman bonkorecon

Ago 28, 1-2.7

Kaj kiam ni saviĝis, tiam ni sciigis, ke la insulo estas nomata Melita. Kaj la barbaroj montris al ni neordinaran bonecon; ĉar ili ekbruligis fajron kaj akceptis nin ĉiujn pro la tiama pluvo kaj pro la malvarmeco.

Proksime de tiu loko estis bieno, apartenanta al la estro de la insulo; lia nomo estis Publio; li akceptis nin kaj amike gastigis nin tri tagojn.

Psalmo 46 [45], 2-12

Dio estas por ni rifuĝejo kaj forto,
Helpe en mizeroj, rapide trovata.
Tial ni ne timas, eĉ se pereus la tero
Kaj la montoj falus en la internon de la maroj.
Bruu, bolu Liaj akvoj,
Tremu la montoj de ilia fiera ondado.

Estas rivero, kies torentoj ĝojigas la urbon de Dio,
La sanktan loĝejon de la Plejaltulo.
Dio estas en ĝia mezo, ĝi ne ŝanceliĝos;
Dio ĝin helpas en frua mateno.

Ekbruis popoloj, ekŝanceliĝis regnoj;
Li sonigis Sian voĉon, kaj la tero fandiĝis.
La Eternulo Cebaot estas kun ni;
Nia defendo estas la Dio de Jakob.

Iru, rigardu la farojn de la Eternulo,
Kiu faris detruojn sur la tero,
Kiu ĉesigas militojn ĝis la fino de la tero,
Rompas pafarkon, rompas ponardegon,
Forbruligas veturilojn per fajro.

Cedu, kaj sciu, ke Mi estas Dio;
Mi estas glora inter la popoloj,
Mi estas glora sur la tero.
La Eternulo Cebaot estas kun ni;
Nia defendo estas la Dio de Jakob.

Luk 14, 12-24

Kaj li diris al tiu, kiu lin invitis: Kiam vi faras tagmanĝon aŭ vespermanĝon, ne voku viajn amikojn, nek viajn fratojn, nek viajn parencojn, nek viajn riĉajn najbarojn, por ke ne okazu, ke ili ankaŭ invitos vin, kaj vi ricevos rekompencojn. Sed kiam vi faras festenon, invitu malriĉulojn, kriplulojn, lamulojn, blindulojn; kaj vi estos feliĉa, ĉar ili ne povas rekompenci vin, sed vi rekompenciĝos en la releviĝo de la justuloj. Kaj aŭdinte tion, unu el la kunsidantoj diris al li: Feliĉa estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de Dio. Sed li diris al li: Unu viro faris grandan vespermanĝon, kaj invitis multajn; kaj en la horo de la festeno li elsendis sian

serviston, por diri al la invititoj: Venu, ĉar ĉio estas jam preta. Kaj ĉiuj tiel same komencis peti pri indulgo. La unua diris al li: Mi aĉetis kampon, kaj mi nepre devas eliri, por ĝin vidi; mi petas, kalkulu al mi indulgon. Alia diris: Mi aĉetis kvin jugojn da bovoj, kaj mi iras, por ilin provi; mi petas, kalkulu al mi indulgon. Kaj alia diris: Mi edziĝis kun edzino, kaj tial mi ne povas veni. Kaj la servisto revenis, kaj rakontis tion al sia mastro. Tiam ekkoleris la mastro, kaj diris al sia servisto: Eliru rapide sur la stratojn kaj irejojn de la urbo, kaj alkonduku ĉi tien la malriĉulojn kaj kriplulojn kaj blindulojn kaj lamulojn. Kaj la servisto diris: Sinjoro, estas farita tio, kion vi ordonis, kaj ankoraŭ estas loko. Kaj la sinjoro diris al la servisto: Eliru sur la vojojn kaj kamplimojn, kaj devigu ilin enveni, por ke mia domo pleniĝu. Ĉar mi diras al vi, ke neniu el tiuj viroj invititaj gustumos mian vespermanĝon.

Medito

Post la traŭmoj kaj konfliktoj de la tempesto en la maro, la praktika zorgo proponita de la insulaj loĝantoj estas rimarkita kiel nekutima bonkoreco de tiuj, kiuj estis malsekegaj en la plaĝo. Tia bonkoreco elmontras nian komunan homarecon. La Evangelio lernigas nin tion ke, kiam ni prizorgas tiujn, kiuj suferadas, ni montras nian amon al la propra Kristo (Vidi Mat 25,40). Krom tio, kiam ni montras aman bonkorecon rilate al la malfortaj kaj senprotektaj, ni agordadas nian koron kun la koro de Dio, en kiu la malriĉaj havas specialan lokon. Korakceptante tiujn, kiuj venas el ekstere, kiuj ajn estu ili, el aliaj kulturoj aŭ kredoj, enmigrintoj aŭ rifuĝintoj, ni estas samtempe amantaj la propran Kriston kaj amante kiel Dio amas. Ĉar ni estas kristanoj, ni estas vokitaj iri antaŭen en la fido ĝis ni atingos ilin per la amo de Dio, kio estas por ĉiuj, eĉ por tiuj, kiujn ni havas malfacilecon ami.

Preĝo

Dio de la orfoj,
de la vidvino kaj de la eksterlandano,
enmetu en niajn korpojn profundan senton de gastameco.
Malfermu niajn okulojn kaj korojn kiam Vi petas de ni vin manĝigi,
vin vesti kaj vin viziti.
Niaj eklezioj povu partopreni la nuligon de la malsato,
de la soifo, de la izoleco kaj de la superado de bariloj,
kiuj malhelpas nin korakcepti ĉiujn.
Ĉi tion ni petas de Vi nome de Via Filo, Jesuo,
Kiu ĉeestas ĉe la malgrandaj el niaj gefratoj. Amen.

TAGO SEPA
Konvertiĝo: Ŝanĝo de niaj koroj kaj mensoj

Ago 28, 3-6

Sed kiam Paŭlo kolektis faskon da vergoj kaj metis ĝin sur la fajron, vipuro, elveninte de la varmo, alkroĉiĝis al lia mano. Kaj kiam la barbaroj vidis la beston pendantan de lia mano, ili diris unu al alia: Sendube ĉi tiu viro estas mortiginto, al kiu, kvankam li saviĝis de la maro, tamen Justeco ne permesas vivi. Sed li forskuis la beston en la fajron, kaj ne suferis malbonon. Sed ili atendis, ke li ŝvelos aŭ falos subite mortinta; sed longe atendinte, kaj vidinte, ke nenia malbono okazas al li, ili ŝanĝis sian opinion, kaj diris, ke li estas dio.

Psalmo 119 [118], 137-144

Justulo Vi estas, ho Eternulo,
Kaj justaj estas Viaj juĝoj.
Vi aperigis Viajn decidojn
Kun justeco kaj plena vero.

Elturmentis min mia fervoro,
Ĉar miaj malamikoj forgesis Viajn vortojn.
Tre pura estas Via vorto,
Kaj Via sklavo ĝin amas.

Mi estas malgranda kaj malestimata;
Sed Viajn ordonojn mi ne forgesas.
Via justeco estas justeco eterna,
Kaj Via instruo estas vero.

Sufero kaj mizero min trafis;
Sed Viaj ordonoj estas mia plezuro.
La justeco de Viaj decidoj estas eterna;
Klerigu min, por ke mi vivu. –

Mat 18, 1-6

En tiu horo la disĉiploj venis al Jesuo, dirante: Kiu do estas la plej granda en la regno de la ĉielo? Kaj alvokinte al si infanon, li starigis ĝin meze de ili, kaj diris: Vere mi diras al vi: Se vi ne turniĝos kaj ne fariĝos kiel infanoj, vi neniel eniros en la regnon de la ĉielo. Kiu do humiligos sin, kiel ĉi tiu infano, tiu estas la plej granda en la regno de la ĉielo. Kaj kiu akceptos unu tian infanon en mia nomo, tiu akceptas min; sed kiu igos fali unu el ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, estus pli bone por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus subakvigita en la profundon de la maro.

Medito

La lokanoj rimarkis, ke ilia juĝo pri Paŭlo kiel murdisto estis malĝusta, tial ili ŝanĝis sian opinion. La eksterordinara evento kun la vipeuo ebligas al la insulanoj vidi aferojn en nova maniero, kiu eble preparas ilin aŭdi la mesaĝon de Kristo per Paŭlo. Dum nia serĉado de kristana unueco kaj repaciĝo ni ofte estas defiitaj repensi kiel ni perceptas aliajn tradiciojn kaj kulturojn. Ĉi tio postulas daŭran konvertiĝon al Kristo, en kiu la eklezioj lernas superi sian

percepton pri la alia kiel minaco. Rezulte niaj malbonaj vidpunktoj pri aliaj estos forĵetitaj, kaj ni alproksimiĝos al unueco.

Preĝo

Ĉiopova Dio, al Vi ni petas en niaj koroj.

Per nia sincera serĉado de via vero,

purigu nin de niaj maljustaj opinioj de aliaj

kaj konduku la ekleziojn kreski en komuneco.

Helpu nin forlasi niajn timojn,

kaj tiel pli bone kompreni unu la alian

kaj la fremdulon inter ni.

Ni petas tion en la nomo de la Justulo,

via amata Filo, Jesuo Kristo. Amen.

TAGO OKA
Bonvolemo: Ricevo kaj Dono

Ago 28, 8-10

La patro de Publio kuŝis malsana en lito, suferis de febro kaj disenterio. Paŭlo eniris por vidi lin kaj post preĝo metis siajn manojn sur lin kaj resanigis lin. Kiam tio okazis, la ceteraj malsanuloj sur la insulo venis kaj estis sanigitaj. Ili honoris nin multmaniere, kaj kiam ni estis pretaj ekveturi, ili provizis ĉion, kion ni bezonis.

Psalmo 103, 1-5

Benu, ho mia animo, la Eternulon,
Kaj mia tuta internaĵo Lian sanktan nomon.
Benu, ho mia animo, la Eternulon,
Kaj ne forgesu ĉiujn Liajn bonfarojn.

Li pardonas ĉiujn viajn pekojn,
Li sanigas ĉiujn viajn malsanojn;
Li savas de la tombo vian vivon,
Li kronas vin per boneco kaj favorkoreco;
Li satigas per bonaĵoj vian maljunan aĝon,
Ke via juneco renoviĝas kiel ĉe aglo.

Mat 10, 7-8

Kaj dum vi iros, prediku, dirante: La regno de la ĉielo alproksimiĝis. Malsanulojn sanigu, mortintojn levu, leprulojn purigu, demonojn elpelu: donace vi ricevis, donace donu.

Medito

Ĉi tiu rakonto temas pri dono kaj ricevo: Paŭlo ricevas nekutiman bonkorecon de la insulanoj. Paŭlo donas resanigon al la patro de Publio kaj al aliaj malsanuloj. Kiam ili pretiĝas ekveturi, la 276 ŝipanoj, kiuj pro ŝtormo perdis ĉion, ricevas abundajn manĝaĵojn. Kiel kristanoj, ni estas vokataj al nekutima bonkoreco. Sed por povi doni, ni devas unue lerni ricevi - de Kristo kaj de aliaj. Pli ofte ol ni rimarkas, ni ricevas bonkorecon de homoj, kiuj diferencas de ni. Ĉi tiu favorkoreco estas signo, ke nia Sinjoro estas bonega kaj donas sanigon. Ni, resanigitaj de la Sinjoro, respondecas pri transdono de tio, kion ni ricevis.

Preĝo

Dio, kiu donas la vivon,
ni dankas Vin pro la donaco de via kompatema amo,
kiu trankviligas kaj fortigas nin.
Ni preĝas al Vi,
por ke niaj Eklezioj estu ĉiam malfermitaj
por ricevi Viajn donacojn de unu la aliaj.
Donu al ni spiriton de malavareco por ĉiuj,
dum ni marŝas kune sur la vojo de kristana unueco.
Ni petas de Vi ĉi tion en la nomo de via Filo,
kiu regas kun Vi kaj la Sankta Spirito. Amen.

LA EKUMENA SITUACIO EN MALTO

Malto, insulo en la mediteranea maro, ricevis la kristanan kredon per la penado de la Apostolo Paŭlo post lia ŝippereo tie dum lia vojaĝo al Romo.

En Agoj 27 kaj 28, oni povas legi la detalojn pri la timiga mar-ŝtormo, pri la 'providenca' ŝippereo kaj pri la posta bonvenigo al la 276 personoj sur la ŝipo, kiuj feliĉe atingis la bordon. Tie rakontiĝas mallonge ankaŭ la kuracada misio de Paŭlo en Malto.

Dum sia longa kaj variigita historio, Malto estis regita de diversaj potencoj: Kartaganoj, Romianoj, Bizancanoj, Araboj, Normanoj, Ŝvabanoj, Aragonanoj, la Kavaliroj de la Ordeno de Sankta Johano, la Francoj, kaj la Britoj. Malto iĝis sendependa nacio en la brita ŝtatkomunumo en 1964. En 2004, ĝi membriĝis en la Eŭropa Unio.

La kristana kredo estas ege enradikigita en la kulturon de la enloĝantoj de Malto kaj de tiuj en la apuda insulo Gozo. Kvankam la nunaj eloĝantoj, ĉ. 430,000, estas ĉefe romkatolikaj, troviĝas krome elstaraj grupoj de kristanoj apartenantaj al aliaj tradicioj. Ekumenismo ne estas nova sperto por la lokanoj. Estante ĉe la krucvojo de civilizacioj, religioj, komerco kaj migrado, la malta popolo estis ĉiam preta akcepti aliajn, estante rimarkinde gastama. La malta popolo konscias, ke la ĝusta manipulado de ĉiutagaj diferencoj povas konduki al reciproka prezado de la respektiva riĉeco de la diversaj eklezioj.

La unua senĉesa kaj nombre signifa ceesto de membroj de aliaj eklezioj datiĝas de la unua duono de la dek-naŭa jarcento. La forta armea kaj mara presenco de britaj deĵorantoj kaj iliaj pastroj eble kondukis al la konstruado de sufiĉaj kaj dignaj ador-lokoj por la membroj de la eklezio de Skotlando (la skota eklezio de Sankta Andreo fondita en 1824 kaj kompletigita en 1857), por la Anglikana komunumo (la kun-katedralo de Sankta Paŭlo fondita en 1839 kaj kompletigita en 1844) kaj por la Metodista eklezio (kompletigita en 1883). La Krimea milito kaj la malfermo de la Sueza kanalo faris el Malto strategian marbazon, kiel ankaŭ nabon de komenco, kaj gravan ŝipriparejon. Grupo de Grekaj ortodoksuloj estis establita en 1816 per Grekoj kaj Kipranoj vivantaj en Malto. Ekde 1990, sentiĝis speciala multobliĝo de membroj de diversaj Ortodoksaj eklezioj. La plejparto konsistas el Orient-eŭropanoj venintaj al Malto por labori. Inter ili troviĝis ortodoksuloj Serbiaj kaj Rusaj, Rumanaj kaj Bulgaraj Ortodoksuloj. Samtempe, grandnombro de Orient-Ortodoksaj kredantoj, precipe el Egiptio, Etiopio kaj Eritreo, trovis rifuĝejon en Malto, forfluginte sian respektivajn landojn pro persekutado.

La samon oni povas diri pri malgrandaj grupoj de Ortodoksaj Kristanoj el la mez-oriento precipe el Sirio kaj Irako. Ĉi tiu variaĵo de Kristanaj eklezioj montras ekumenan scenejon vere vibran. La unuaj ekumenaj renkontiĝoj en Malto okazis en la milnaŭcent sesdekaj jaroj, kiam eta grupo de Rom-Katolikaj pastroj konstante renkontiĝis kun grupo de pastroj el la brita armeo postenigita en Malto. Ili diskutis komunajn interesaĵojn kaj kune preĝis. Kunlaborado inter Maltaj bibliaj kleruloj kaj pastroj el diversaj kristanaj tradicioj estis ankaŭ oftaj kaj fruktodonaj. Oni konscias, ke pluraj el ĉi tiuj ekumenaj renkontiĝoj estis fonditaj sur profunda amikeco. La Malta Biblia Societo kunlaboris kun pastroj el diversaj Kristanaj grupoj. La unuaj Ekumenaj Diservoj en Malto okazis fine de 1960 kaj komence de 1970. Plue, la unuaj renkontiĝoj de ARCIC kaj de la Luterana-Katolika Dialogo okazis en Malto. En oktobro de la jaro 1977, la Katolika ĉefpastro de Malto, lia ĉefepiskopa Moŝto Joseph Mercieca, iniciatis diocezan ekumenan komision. Ĝia celo estis kuraĝigi preĝadon por kristana unuiĝo kaj por antaŭenigi katolikajn konsciiĝon kaj komprenon pri la ĉeesto de aliaj kristanaj grupoj.

En 1995, Patro Maurice Eminyan, s.j. iniciatis la Maltan Ekumenan Koncilon, hodiaŭ nomita „Kristanoj kune en Malto”. Ĉi Koncilo inkluzivigas reprezentantojn de la diversaj eklezioj. Ĝi renkontiĝas ĉiudumonate por diskuti ekumenajn problemojn, por organizi renkontiĝojn cele al publika dialogo, kaj kunlabore kun la dioceza komisio ekumena, por plenumi la enhavon kaj la organizajn aranĝojn de ekumenaj servoj. La ĉefa ekumena servo okazas en januaro dum la dua Semajno Por Preĝado por kristana unueco. Alia servo okazas dum la tagoj antaŭ aŭ post la Pentekosta festo. La membroj de ‘Kristanoj kune’ en Malto konsistas el la Rom-Katolika eklezio, la Anglikana eklezio, la Skota eklezio, la Metodika eklezio, la Evangeli-Luterana eklezio, la Grek-Ortodoksa eklezio, la Serb-Ortodoksa eklezio, la Rus-Ortodoksa eklezio, la Rumana Ortodoksa eklezio, la Bulgara Ortodoksa eklezio, la Kopt-Ortodoksa eklezio. La Sep-Yagaj Adventistoj estas parto de ĉi koncilo.

En Malto, ekumenaj rilatoj prosperas. La labor-rilato estas notita per profunda respekto kaj aŭtenta kunlaboro. La Rom-Katolika eklezio en Malto helpis la diversajn Ortodoksajn ekleziojn por trovi taŭgan lokon por adorado. Simile, la Rom-Katolika diocezo de Gozo malfermis siajn pordojn por provizi ador-lokojn por Anglikanoj kaj aliaj kristanoj el la Reform-tradicioj.

Krom la kutimaj ekumenaj servoj, aliaj konstantaj notindaj ekumenaj gestoj en Malto inkluzivas la jenajn:

- komuna projekto de servado, ĉu surloke ĉu eksterlande, kiuj ricevas financan subtenon de la Kristanaj komunumoj;
- la Kristnaska Festivalo de Naŭ Lecionoj ĉe la kun-katedralo de Sankta Paŭlo en La Valetto, implikas la partoprenadon de ekumenaj samkredantoj;
- Ekumena festo gastigita de la malta katolika ĉefepiskopo, dum la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj;
- komunaj entreprenoj, kiel ekzemple vizitoj al la malsanuloj kaj maljunuloj;
- ĝojkantado, kaj eventoj okaze de la Monda Tago de Preĝado pri la Kredo;
- reciproka partopreno de Kristanaj estroj en Malto ĉe specialaj patron-festoj;
- kunlaborado kun Sankta Andreo, Skota Eklezio, subtene al la Manĝaĵ-Banko;
- la Lumtur-Retaĵo, kiu arigas Kristanojn ĉiudumonate cele al preĝado kaj laŭdado;
- partoprenantoj de diversaj kristanaj tradicioj kunlaboras preparante pli altan edukan premion pri Ekumenismo organizita de la dioceza ekumena komisio kune kun la Instituto de pastra formado de la ĉefdiocezo de Malto;
- la Prezidento de la Malta Respubliko ĉiujare invitas ekleziajn ĉefojn al rondo- tabla diskutado kaj al Kristnaska manĝo iom antaŭ Kristnasko.

Ekumena kunlaborado laŭ diversaj niveloj helpis antaŭenigi la aferon de kristana unio en Malto. La ekumena klimato en Malto estas vere pozitiva, kaj povas vere servi, kiel mikrokosmo de ekumena dialogo sur universa nivelo.

KELKAJ GRAVAJ DATOJ ŜLOSILAJ DATOJ EN LA HISTORIO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

- ĉ. 1740: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezioj
- 1820: Sac. James Haldane Stewart publikigis „Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluo de la Spirito“ (Hints for the outpouring of the Spirit) 1840: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas „Unuiĝon de preĝado por Unueco“
- 1867: La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj
- 1894: Papo Leono la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto
- 1908: Unua okazigo de la „Preĝosemajno por la unueco de Eklezio“ en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson
- 1926: La Movado „Fido kaj Konstitucio“ komencas publikigon de „Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj“ okaze de Pentekosto
- 1935: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por „unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras“
- 1941: Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono
- 1958: La Ekumena centro „Kristana unueco“ el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj
- 1964: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu“(Joh 17, 21)
- 1964: La „Dekreto pri ekumenismo“ de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco
- 1966: La Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno
- 1968: la unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio“ kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)
- 1975: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis la ekumena grupo el Aŭstralio
- 1988: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando
- 1994: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)
- 2004: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita
- 2008: n la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj
- 2010: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado

PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ TEMOJ 1968-2020

En 1968, estis unue uzitaj materialoj kune preparitaj de la Komisiono pri Fido kaj Konstitucio de la Monda Konsilio de Eklezioj, kaj la Papa Konsilantaro pri la Antaŭenigo de Unueco de la Kristanoj.

1968: Por laŭdo de Lia gloro (Efe 1,14)

1969: Vokitaj al libereco (Gal 5,13) (Prepara kunsido en Romo, Italio)

1970: Ni estas kunlaborantoj kun Dio (1 Kor 3,9) (Prepara kunsido ĉe la monaĥejo de Niederaltaich, Federacia Respubliko Germanio)

1971: ... kaj la kuneco de la Sankta Spirito (2 Kor 13,13)

1972: Novan ordonon mi donas al vi (Joh 13,34) (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1973: Sinjoro, instru nin preĝi (Luko 11,1) (Prepara kunsido ĉe la abatejo de Montserrat, Hispanio)

1974: Ĉiu lango konfesu, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro (Fil 2,1-13) (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1975: La celo de Dio: sumigi en Kristo ĉion (Efe 1,3-10) (Materialo de aŭstralia grupo. Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1976: Ni estos similaj al li; (1 Joh 3,2) aŭ, Alvokita fariĝi tio, kio ni estas (Materialo de Kariba Konferenco de Eklezioj. Prepara kunsido en Romo, Italio)

1977: Kune elteni en espero (Rom 5,1-5) (Materialo el Libano, dum interna milito. Prepara kunsido en Ĝenevo)

1978: Jam ne fremduloj (Efe 2,13-22) (Materialo de ekumena grupo en Manĉestro, Anglio)

1979: Servu unu al la alia por la gloro de Dio (1 Pet 4,7-11) (Materialo el Argentino - prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1980: Venu via regno (Mat 6,10) (Materialo de ekumena grupo en Berlino, GDR, prepara kunsido en Milano)

1981: Unu Spirito - diverseco de donacoj - unu korpo (1 Kor 12,3b-13) (Materialo de Graymoor Fathers, Usono – prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)

1982: Ke ĉiuj trovu sian hejmon en vi, ho Sinjoro (Psa 84) (Materialo de Kenjo - prepara kunsido en Milano, Italio)

1983: Jesuo Kristo – la Vivo de la Mondo (1 Joh 1,1-4) (Materialo de ekumena grupo en Irlando - prepara kunsido en Céligny (Bossey), Svislando)

1984: Alvokitaj esti unu per la kruco de nia Sinjoro (1 Kor 2,2 kaj Kol 1,20) (prepara kunsido en Venecio, Italio)

1985: De morto al vivo kun Kristo (Efe 2,4-7) (Materialo el Jamaiko - prepara kunsido en Grandchamp, Svislando)

1986: Vi estos miaj atestantoj (Ago 1,6-8) (Materialo el Jugoslavio/Slovenio, prepara kunsido en Jugoslavio)

1987: Unuiĝinta en Kristo - Nova Kreitaĵo (2 Kor 5,17-6:4a) (Materialo el Anglio, prepara kunsido en Taizé, Francio)

1988: La amo de Dio elĵetas timon (1 Joh 4,18) (Materialo el Italio, prepara kunsido en Pinerolo)

1989: Konstrui komunumon: unu korpo en Kristo (Rom 12,5-6a) (Materialo el Kanado - prepara kunsido en Whaley Bridge, Anglio)

1990: Ke ili ĉiuj estu unu ... Ke la mondo kedu (Joh 17) (Materialo el Hispanio - prepara kunsido en Madrido, Hispanio)

1991: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj! (Psa 117 kaj Rom 15,5-13) (Materialo el Germanio - prepara kunsido en Rotenburg der Fulda, FR Germanio)

1992: Mi estas kun vi ĉiujn tagojn... Iru do (Mat 28,16-20) (Materialo el Belgio - prepara kunsido en Bruĝo, Belgio)

1993: Porti la fruktojn de la Spirito por la unueco de kristanoj (Gal 5,22-23) (Materialo el Zairio - prepara kunsido apud Zuriko, Svislando)

1994: La familio de Dio: alvokata esti unu, kore kaj mense (Ago 4,23-37) (Materialo el Irlando - prepara kunsido en Dublino, Respubliko de Irlando)

1995: Koinonia: komuneco en Dio kaj unu kun la alia (Joh 15,1-17) (Materialo el Fido kaj Konstiucio, prepara kunsido en Bristol, Anglio)

1996: Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas (Apo 3,14-22) (Prepara materialo el Portugalio, kunsido en Lisbono, Portugalio)

1997: Ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio (2 Kor 5,20) (Materialo de Nordia Ekumena Konsilantaro, prepara kunsido en Stokholmo, Svedio)

1998: La Spirito helpas nian malfortecon (Rom 8,14-27) (Prepara materialo el Francio, kunsido en Parizo, Francio)

1999: Dio loĝos kun ili, kaj ili estos Lia popolo (Apo 21,1-7) (Prepara materialo el Malajzio, kunsido en Monaĥejo de Bose, Italio)

2000: Benata estu Dio kiu benis nin en Kristo (Efe 1,3-14) (Prepara materialo de la Konsilantaro de la Eklezioj de Mezoriento, kunsido en La Verna)

2001: Mi estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo (Joh 14,1-6) (Prepara materialo de Rumanio kaj kunsido ĉe Vulcan, Rumanio)

2002: Ĉe Vi estas la fonto de vivo (Psa 36,5-9) (Prepara materialo CEEC kaj CEC, kunsido apud Augsburg, Germanio)

2003: Ni havas ĉi tiun trezoron en argilaj vazoj (2 Kor 4,4-18) (Prepara materialo el eklezioj en Argentino, kunsido ĉe Los Rubios, Hispanio)

2004: Mian pacon mi donas al vi (Joh 14,23-31) (Prepara materialo el Aleppo, Sirio - kunsido en Palermo, Sicilio)

2005: Kristo, unika fundamento de la Eklezio (1 Kor 3,1-23) (Prepara materialo de Slovakio - kunsido en Piestañy, Slovakio)

2006: Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili (Mat 18,18-20) (Prepara materialo el Irlando - kunsido en Prosperous, Co. Kildare, Irlando)

2007: Li igas la surdulojn aŭdi, kaj la mutulojn paroli (Mar 7,31-37) (Prepara materialo el Sud-Afriko – kunsido en Faverges, Francio)

2008: Preĝu senĉese (1 Tes 5, 12a.13b-18) (Prepara materialo el Usono – kunsido en Graymoor, Garrison, Usono)

2009: Ke ili fariĝu unu en Via mano (Eze 37,15-28) (Prepara materialo el Koreio – kunsido en Marsejlo, Francio)

2010: Vi estas atestantoj pri tio (Luk 24,48) (Prepara materialo de Skotlando – kunsido en Glasgovo, Skotlando)

2011: Ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj (Ago 2,42) (Prepara materialo el Jerusalemo – kunsido en Saydnaya, Sirio)

2012: Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto (1 Kor 15, 51-58) (Prepara materialo el Pollando – kunsido en Varsovio, Pollando)

2013: Kion la Sinjoro postulas de ni (Miĥ 6, 6-8) (Prepara materialo el Hindio – kunsido en Bengaluro, Hindio)

2014: Ĉu Kristo estas dividita? (1 Kor 1,1-17) (Prepara materialo el Kanado – kunsido en Montrealo)

2015: Donu al mi trinki (Joh 4,7) (Prepara materialo el Brazilo, kunsido en São Paulo)

2016: Vokitaj por anonci al ĉiuj la mirindaĵojn de Dio (kp. 1 Pet 2,9) (Prepara materialo el Latvio – kunsido en Riga)

2017: La amo de Kristo pelas nin al la repaciĝo (kp. 2 Kor 5, 14-20) (Prepara materialo Germanio)

2018: Via dekstra mano, ho Eternulo, estas glora per forto (Eli 15,6) (Prepara materialo – Karibio)

2019: Justecon, justecon sekvu (Readmono 16,11-20) (Preparita de la kristanoj en Indonezio)

2020: Ili montris al ni neordinaran bonecon (Ago 28, 2) (Preparitaj de la kristanoj de Malto)